

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gilli Nort, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 180
24. 2. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 50% (por ĉiuj aliaj,
landoj 0,05 dot. aŭ 0,25 sv. fk.)

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fk.),
ĉu „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Esperanta Akademio Intern. esplorado pri proverboj.

Gvida cirkulero.

La kunlaborantoj en la esplorado pri proverboj devas antaŭ ĉio memori la ĝustan celon de la esplorado: tiu ĉi tute ne celas la diskonigon de la diverslingvaj naciaj proverboj; ĝi celas nur la pliriĉigon kaj plifleksebligon de la esperanta stilo per enkonduko de metaforaj kaj bildaj esprimmanieroj internacie kompreneblaj.

Sekve nur tiaj naciaj proverboj, kiuj enhavas metaforon aŭ bildon, kies laŭvorta traduko estas internacie ĝenerale komprenebla, estas kolektindaj.

Tamen oni devas rimarki, ke ofte ia bilda aŭ metafora esprimo, kiu ne estas internacie komprenebla, povas facile fariĝi tia per ia trafa ŝanĝeto de vortoj aŭ per ia preciziga aldono.

Por ke la internacia komprenebleco de ĉiu esperantantradukita proverbo povu esti kontrolata, la kunlaborantoj aldonu al ĉiu laŭvorta aŭ proksimume laŭvorta metafora traduko laŭsignifan tradukon, kiu cetere ankaŭ utilos por la klasigo de la kolektita materialo, kiun faros la Centra Komisiono.

Estas nepre necese ke, laŭ la propono de kelkaj kolegoj, ĉiu proverbo estu skribita sur apartan folieton de papero, ne tro pezant, pro la poŝtkostoj. Tiuj folioj estu de sama formato, kiel la poŝtkartoj, kaj surskribitaj laŭ la direkto de la plimallarĝeco.

Oni lasu supre de la folieto aŭ slipo neskribitan lokon, sufiĉan, por ke la Centra Komisiono povu tie skribi la titolon, tio estas la resuma vorto, kiu ebligas la klasigon.

Oni surskribu unue la laŭsignifan tradukon, poste la laŭvortan aŭ proksimume laŭvortan tradukon. Estas aparte dezirinde, ke neŭropoj, precipe japanoj kaj ĥinaj partoprenu la laboron pri la proverboj.

Ĉiu kompetenta esp-isto, kiu estas preta kunlabori, bonvolu sin turni al la direktoro de la Akademio Sekcio por la Komuna Vortaro. Adreso: Prof. E. Grosjean-Maupin, 14 Rue du Val d'Osne, Saint-Maurice (Seine), Francujo.

Th. Cart, prez. de L. K. Prof. E. Grosjean-Maupin.

Radiotelefonaj paroladoj pri Ĉeĥoslovakio.

Sekve de la sukcesinta parolado pri ĉeĥosl. turismaj allogaĵoj, atskultita en ĉiuj partoj de Eŭropo kaj priskribita en multaj ĵurnaloj diversnaciaj, aranĝos „Radio-Journal“ de Praha el sia stacio Kbely apud Praha (ondlong. 1150 m) la jenajn esp-ajn paroladojn de s-o Pitlik:

1. dimanĉon, 1 marto, 21 h. (centroeŭropa tempo) pri la plej eminenta ĉeĥa komponisto Frederiko Smetana, kies centjaran naskiĝan datrevenon la ĉeĥa nacio kaj Ĉeĥoslovakio pompe solenos kaj kies opero „Vendita fianĉino“ estas prezentita en ĉiuj ĉefaj operoj de la mondo. La paroladon antaŭiros koncerto radiotelefona (de la 19 h. 15 m.—21 h.), enhavanta ĉefajn komponaĵojn de Smetana;

2. lundon, 17 marto, 21 h. (centroeŭropa tempo) pri „Specimena Foiro de Praha“, malfermata la 16. 3. (La parolado okazas je speciala peto de la foirestraro). La paroladon antaŭiros de 19 h. 15 m. koncerto.

Esp-istoj, delegitoj de UEA, raportu en viaj naciaj gazetoj pri la paroladoj, instigu la muzikamantojn, komercistojn kaj fakulojn atskulti kaj ne prete sendu tiurilatajn gazetarikolojn por „Radio-Journal“ al A. Pitlik, Praha II, 1999. En viaj manoj estas la venko de Esp. en ĉeĥosl. radiotelefonio, kiu estos ankaŭ via venko!



Fiume. — Riva Emanuele Filiberto.

Konjektante intereson de nia legantaro ni publikigos hodiaŭ priskribon de la libera urbo Fiume, la objekto de akraj bataloj politikaj, kies detalojn oni konas el la ĵurnaloj.

FIUME.

Fiume, kiu rajte povas esti nomata perlo de la Adriatiko, kuŝas kvazaŭ modeste kaŝite en la golfo de la blua-verde koloriginta akvo de la maro Adriatika.

La urbo — kompreneble kiel aliaj multaj urboj de Eŭropo, kaŭze de mondkuanta militigo, kiu lasis ankaŭ ĉi tie siajn postsignojn de kruelaj ruinigoj — ne havas plu sian iaman belan, vigan kaj interesan aspekton.

Etan viglecon donas al haveno kelkaj vaporŝipoj, kiuj transirigas la vojaĝantojn tien kaj reen al bone konataj marbaneloj de Volosca, Abbazia, Ika kaj Lovrana, kaj kelkaj ŝarĝoŝipoj, kiuj interkomunikigas inter Fiume kaj najbaraj insuloj. Kio koncernas la komercon kaj industrion, Fiume ludis grandan rolon antaŭ la milito, dank' al siaj bonege konstruitaj havenabajaĵoj tiel nomataj moleoj.

Fiume estas ekskluzive komerca kaj industria urbo, ĝi estas fiera pri multaj fabrikoj, kiaj estas fabriko de vinagro, kiu plu ne funkcias, sed siatempe ekspedis 500—600 vagonojn da vinagrado po jare. La fabriko de produktajto kemiaj, produktanta inter aliaj acidojn klorhidran, nitracidon kaj sulfacidon. „Ganz“ kaj „Danubius“ ŝipfabriko, kiu ampleksas grandan teritorion laboriganta nuntempe nur malmultajn laboristojn. Ĝi estas nun sub itala administrado. Ĉi tie estas konstruita krom aliaj ŝipegoj la militŝipego „Szent István“, kiu dum la mondmilito estas subakvigita. Apude estas la mondfama torpedofabriko de „Withead“, kiu ankaŭ devis fermi siajn laborlokojn. Plue du oleo-fabrikoj kiuj kuniĝis, poste la tanin-fabriko, ellaboranta la necesajn materialojn por la fabrikado de ledo, ambaŭ ne plu funkcias.

Apud la gas-fabriko estas la rafinejo de petrolo kaj rizarafinejo, ili estis ankaŭ devigataj malplimultigi la laborfortojn.

Kontraŭ tiuj kuŝas la 4 km longa bone konstruita stacio kun sia vasta fervoja linio kun petrolhaveno.

Antaŭ la mondmilito la stacio de Fiume liveris ĉ. 400—500 vagonojn da komercaĵoj po jaro, tiel ke po jare ĉirkaŭ 100 000 vagonoj da sukero, greno kaj magnezito estis liveritaj eksterlandan, same kiel rizo, juto, kotono kaj aliaj artikoloj.

La stacio ampleksas inter alie 16 grandajn 2- kaj 4-etaĝajn modernajn magazenojn, kiuj kapablas akcepti 40 000 vagonojn da varoj. La magazenoj estas ekipitaj per elektraj leviloj kaj per tielnomataj glitiloj, kiuj servas por malsupren-glitigi la varojn, starantajn en supraj etaĝoj. Ĉi

tiuj 2- kaj 4-etaĝaj magazenoj estas konstruitaj en la haveno, kiu havas ĉirkaŭ 20 elektrajn gruojn, por rekte en- kaj elŝipigi la varojn. Ĉiu elektra maŝino havas levkapablon de 1500 kg. La daŭrigon de la stacio tra la urbo al oriento kompletigas la du grandaj senŝarĝigejoj por ligno t. n. Delta kaj Brajdica kun turnpontoj kaj fervoja linio. Ne malproksime al ili kuŝas la forkforma „Porto Baross“ (aŭ Porto Sauro) provizita je unu flanko per 7, je alia flanko per 4 elektraj gruoj, ĉiu el ili kiel la aliaj havas levkapablon de 1500 kg. Sed ili nun de longe jam malgaje rigardas la maron kaj ŝiparon ne estante utiligataj.

Apude al Porto Baross estas malgranda ŝip-fabriko, pli bone ŝip-riparejo „Lazarus“, kiu sin okupas pri riparo de ŝipoj. De ĉi tiu okcidenten kuŝas la t. n. „Molo longo“, ekipita sammaniere

per elektra gruo. Krom tio Fiume havas malgrandan ferfandejon, perget-fabrikon, fabrikon de ŝnuregoj kiel ankaŭ entreprenojn por fabrikado de ŝapo kaj ĉokolado. Ĝi havas centrejon de elektra fluo, plue centran akvo-kondukelon, kaj du egajn rezervujojn, el kiuj la akvo estas suprenpremata al monto kaj per kiu estas provizata la tuta urbo je bona freŝa akvo, kiu enhavas iom da kalko, sed despli multe da fero.

Fiume konsistas el du partoj: el nova kaj malnova urbo. Ĉi tiu lasta estas restaĵo de la iama Fiume kun tre mallarĝaj stratoj.

Notindaj estas el roma epoko la triumfa arko de roma imperiestro Claudio II. La urba turo, ankoraŭ restaĵo de tiu kvartara fortikaĵo, kiu iam ĉirkaŭis la urbon. Krom blazono de la urbo la turo surhavas dukapan aglon, tenanta inter siaj ungegoj renversitan pokalon, el kiu fluas akvo; sube la jena devizo: „Indeficienter“. La fasado de la historia turo estas ornamita per gravuraĵo, prezentanta la brustbildon de imperiestroj Leopoldo kaj Karlo VI.

Sur malnovaj bildoj oni vidas, ke la teritorion, kie estas konstruita la moderna urbo, kovris la maro etendinta sin ĝis la turo.

Inter la konstruaĵoj estas menciindaj la borso, la guberniestra palaco, la eksa aŭstria-hungara militmarista akademio (en lasta jaro ĝi estas aliformigita je malsanulejo), la marista akademio, la opera teatro „Verdi“ kaj la popolteatro „Fenice“. Pluaj institutoj por georfoj kaj por helpebezonaĵoj gejunuloj. Fiume estas riĉa ne nur je popolaĵ, sed ankaŭ je superaj kaj teknikaj lernejoj.

Fiume post la renversigo travivis tre malfacilajn tagojn. La ĉiama batalado inter la diversaj partioj kaj inter la koncernataj politikaj rondoj, rilate al sorto de Fiume daŭras ankoraŭ ĉiam. Du partioj staras unu kontraŭ alia; la unua postulas la memstarecon de Fiume kiel sendependa ŝtato; la alia ĝian aliĝon al Italujo. La kernpunkto de la diskutado estas „Porto Baross“ kaj Delta, kies ekposedon postulas kiel Fiume tiel Jugoslavio. Al kia ŝtato ĝi apartenu, kiu partio estas prava aŭ malprava, mi ne rajtas diskuti ĉi tie. Tion mi lasas al tiuj politikaj rondoj, kiuj estas destinataj solvi ĉi tiun delikatan demandon tiamaniere, ke ĉiuj estu kontentaj kaj povas vivi kaj labori. Estu nur permesate diri, ke ĝis ĉiam la interesataj politikaj rondoj ne sukcesos interkonsenti pace kaj juste, ĝis tiam la antaŭmilita paca vivo ne estos restarigata.

Fiume havas proksimume 50 000 loĝantojn, kaj konsistas el diversaj elementoj parolantaj italan dialekton, italoj, slavoj, hungaroj kaj germanoj. La oficiala lingvo estas itala.

La ĉi tiea esp. movado, pri kiu certe interesiĝas nia tutmonda ges-anaro, bedaŭrinde ne staras ankoraŭ sur dezirata nivelo. Ĝi travivas ankoraŭ sian lulilempon. La esp. grupo de Fiume estas gvidata de fervora s-ano Jozefo Sikić, kiu jam de 3 jaroj penas kaj oferas volonte sian liber-

tempon por instrui nian lingvon, klopodante disvastigi ĝin inter la loĝantaro.

Mi devas ankoraŭ aldoni, ke la lastaj 5 jaroj de politika malfavora situacio, kiun travivis la loĝantaro, influis ankaŭ multe nian movadon, sed mi esperas, ke alvenos ankaŭ ĉi tie la tempo, kiam la homoj ekkomprenos la alian celon ankaŭ korpigitan en la ideo de Esp., kiu sole estas destinata efektiviĝi la tiom sopratran pacon inter la gentoj: konsideri la proksimumon kiel nin mem, elradikigante el la koro ĉiun antipation, kiun kontraŭstarigas, ho! tiom da homoj kontraŭ aliaj homoj.

Anna Maudiĉ, Fiume.

Scienco.

Mineralogio.

Fiasco de diven-vergo.

Ekzistas societo kiu nomas sin: „Internacia Federacio de Diven-vergistoĵoj“. Ili pretendas esplori la enhavon de la tereno per fikse portata vergeto pere de fiziologiaj nervaj efikoj de la masoj sur la homan nervosistemon. Okazis ĝis nun multaj provoj, kiuj parolas parte por, parte kontraŭ la diven-vergo. Laste la Prusa Landa Geologia Instituto aranĝis eksperimentadon, kiu estis direktata de miksiita komisiono de diven-vergistoĵoj, geologoj kaj fizikistoj. Oni esplorigis jam konatajn teritoriojn. „Ĉiuj indikoj de la diven-vergistoĵoj estis falsaj“ — diras la raporto. Kvankam el tia ekzameno ne ankoraŭ sekvas plena netaŭgeco de iu teoremo, ni denove vidas, kiom singardaj ni devas esti ĉe tiaj diven-rezultatoj kaj kiel malcerte ili estas bazigitaj. Efektive la ekzaktaj metodoj estas preferitaj: se temas pri esploro de terinteraj, oni faru boradojn aŭ aranĝu delikatan pendoleksperimenton.

Arkeologio.

Ĉe la sarkofago de la faraono.

Telegramo de 13 februaro el Luxor en Egiptujo raportas: „Hieraŭ posttagmeze je la 5.40 h. estas malfermita la sarkofago de l' faraono Tut-Ank-Amon. La ĉerkego estas 3 metrojn longa kaj speciale riĉe ornamita, kiel oni ĝis nun trovis nenie en Egiptujo. La mumio kuŝis sendifekta en la sarkofago. La egipta registaro malpermesis lasmomente la ĉeston al la malfermo al ĵurnalistoj kaj aliaj scivolemluloj. Krom la arkeologo Carter, lia asistanto kaj D-o Derry (kiu faris fotografadojn de la mumio per radioj de Roentgen) ĉeestis nur 3 reprezentantoj de la egipta registaro.“

Joh. Bernhard, München.

Literaturo.

Aleksa Ŝantiĉ ĉ.

Aleksa Ŝantiĉ, granda serba poeto, mortis la 2. febr. en Mostar (Jugoslavio).

Aleksa Ŝantiĉ naskiĝis la 27. majo 1868 en Mostar en eminenta komercista familio. Li, fininte la komercistajn studojn, dediĉis sin al poemverkado, por kiu li laŭŝajne estis antaŭdestinita de sia naskiĝo. Kiel granda idealisto kaj homamanto en siaj verkoj li varme okupiĝis pri vilaĝano kaj laboristo.

Li ankaŭ sin okupis pri dramo kaj verkis „Sub nebulo“, „Hasanaginica“, „Suno“, ĉiuj bon-egaj verkoj.

Krom tio li multe tradukadis el rusa, germana kaj ĉeĥa lingvo. Plej multe li ŝafis kaj amis germanan lirikiston Heine.

Per morto de Aleksa Ŝantiĉ jugoslaviana literaturo perdas grandan homon kaj noblan animon.

Dan. T., Mostar.

Tekniko.

Elektro.

Perspektivoj de la elektra lumigado.

Dum la lasta tempo la plej populara branĉo de la elektrotekniko estis sendube la radiotelegrafado kaj telefonado. La publiko laŭŝajne perdis la intereson pri alia ĉapitro de tiu ĉi moderna tekniko, ĉapitro, kiu dum longaj jaroj estis aktuala: la elektra lumigado. Dume la radiotekniko estas nur iaspeca amuzaĵo por la privata homo, la problemo de la lumigado private interesas ĉiun opan familion. Oni ja ne pensu, ke la problemo de la lumigado ekĉesis; dume en la pasinta jardeko agiĝis pri la ekzistado de la elektra lumigado, hodiaŭ agiĝas pri tio, kiamaniere ni povus utiligi la grandan energion konstante perdatan per niaj malperfektaj lampoj, kiamaniere ni povus pligrandigi la efektan, malpligrandigi la kostojn de elektra lumigado. Dume niaj motoroj, generatoroj kaj transformatoroj funkcias per preskaŭ ideala efekte, niaj elektraj lampoj estas malpli perfektaj ol la primitiva kranko-mekanismo de vapormasinaĉo. Netolerabla stato, kiun multaj eltrovintoj deziris aliigi. Laboroj konstante daŭras en ĉiutaga laboratorioj. Karbofadenoj estis anstataŭgataj per metaĵfadenoj, platendroj per aliaj substancoj. Evoluoj estas nepre citeblaj, sed la celo estas ankoraŭ malproksima.

Metalurgio.

Rekordo en la metal-turnado.

Laŭ anonco de la Children's Newspaper, London: la Ĝenerala Elektra Kompanio farigis ŝafton por grandega elektromotoro, havanta la efektan de 3000 ĉevalpovoj. La ŝafto estis turnata sur grandega aŭtomata stablo kaj la laboro sukcesis mirinde precize. Konate estas, ke precizeco de elektraj maŝinoj devas esti tre granda. Tie ĉi oni laboris ĝis la precizeco de $\frac{1}{1000}$ da inĉo.

Internacia trafiko.

Radio-telefonio en Svedujo.

La radiotelefonio evoluigas en Svedujo. Por la uzado de radioaparato oni devas havi permeson de la registaro, kaj tiu donis dum la lastaj monatoj ĉirkaŭ 11000 permesojn. La havigo de tia permeso kostas 3 kronojn 50 oerojn.

La elsendo de programoj prizorgas de stacioj, unu el tiuj apartenas al la ŝtata telegrafo kaj la alia al privata kompanio. La ĉiutagaj k. a. gazetoj aranĝas koncertojn ktp., kiujn elsendas la stacio de la telegrafo. Ankaŭ diservoj kaj operoj estas elsendataj. H. H.

Disvastigo de aŭtomobiloj.

Laŭ plej nova statistiko la nombro de la aŭtomobiloj, kiuj hodiaŭ ĉirkuilas sur la terglobo, estas 11 milionoj. El tio 83%₀, do 9 milionoj apartenas sole al la Unuigitaj Ŝtatoj, kie po 11 loĝantoj ekzistas unu aŭtomobilo. Tiu ĉi nombro estas en sekvantaj landoj: Kanado 21, Novze-lando 41, Aŭstralio 64, Kubo 94, Anglujo 110. La grandega progreso sur tiu ĉi kampo estas okulfrapa.

Internacia sporto.

En tolboato ĉirkaŭ la mondo.

Instigite per la artikolo en n-o 175 de ET, ankaŭ mi povas raportii pri ĉirkaŭmonda vojaĝo de 3 germanoj per tolboato: s-oj Hiller, Kaestner kaj Woderer forlasis meze de decembro 1923 sur la rivero Isar la urbon München por ĉirkaŭvojaĝi la mondon sole per sia tolboato laŭ jena fiksita vojaĝlinio: sur la riveroj Isar, Danubo al la Nigra Maro, norda bordo de Malgrandazio, per fervojo Rion-Suram, Tiflis, Kaspia Maro, nordbordo de Persujo, piede al Neri Rud, Herat, Kabul, Indus, fervojo al la riveroj de l' Ganges, per kanaloj tra Delhi, Cawnpur, Benares al Kalkutta, Brahma-putra, piede al rivero Iravadi, Rangoon, piede al rivero Meping, Bangkok, laŭlonge de l' duon-insulo Malacca, Singaporo, kruciĝo de la ekvatoro en Sumatra, vaporsipe de Singaporo-San Francisko, rivere Yellowstone, Missouri, Chicago, lagoj de Michigan, Huron, Erie, akvofaloj de Niagara, Ontariolago, Hudson, New York kaj de tie per vaporsipo al Eŭropo. Do, la vojaĝo okazos plejble en regionoj, riĉaj je ŝipireblaj riveroj kaj lagoj.

La boato estas longa 6 m, havas larĝecon de 1,2 m kaj pezas kun 9 m² da velo 3 centfuntojn. Por malfaciligi la renversigojn, ĝia supra rando estas ĉirkaŭita per veltola tubo, plenigita je kapoko. La antaŭa kaj malantaŭa parto de l' boato estas provizitaj per aerujoj. La dorsapogiloj de la oportune aranĝitaj sidiloj servas samtempe ankaŭ kiel matracoj.

Entute la boato povas porti unu tunon; portante la faktan komencan pezon de 12 centfuntoj, la ŝipeto enakvigas nur 20 cm.

La vojaĝo mem estas jam preparita depost unu jaro. Pri ĝi mi donos pluajn sciigojn post ricevo de ili. Mi petas ankaŭ la gesamideojn, loĝantaj en la supre cititaj trapasotaj regionoj kaj aŭdantaj pri la trapaso de la tri sportistoj, tuj doni sciigojn al ET por enpresio en naciaj gazetoj, tiamaniere montrante kaj pruvante la rapidan, internacian informservon pere de Esp. Joh. Bernhard, München.

Diversaĵoj.

Astronomiaj nombroj.

En unu el la lastaj numeroj de ET troviĝis la cifero de la „ilionoj“ multe bezonataj kaj uzataj nun en kelkaj eŭropaj landoj por la malbonega stato de la valutoj. Jen en konekto kun ili kelkaj astronomiaj nombroj.

Oni apenaŭ povas imagi ekz. la distancon inter la germana or-marko kaj la papera marko germana. Strangan proporciojn povas esti konstataj: Laŭ la Berlina kurzo la proporcio de la supre nomitaj valutoj unu al alia egalas al 0,04 mm de la ĉirkaŭo de l' tuta tero. Mezuro de 0,04 mm ja ne estas videbla sole per la okulo; do estas eble la sama, se oni prenas $\frac{1}{8}$ mm, la diametro de malgranda sablero, kompare al la distanco de l' luno al la tero; aŭ imagu longon de 150 m kaj komparu ĝin kun la distanco inter tero kaj suno. Eble kelkaj personoj pli bone komprenas, se oni komparas gutojn da akvo je enhavo de 1 mm³ kun akvofesejo 1 km longa, 1 m larĝa, kaj 1 m profunda.

La regna banko germana ne kapablas konstati (ĉar estas eldonitaj grandaj sumoj de help-

mono), kiom da papermono ĉirkuilas nuntempe; oni taksas ĝin eble je 200 ĝis 400 trilionoj.

Kio nun estas unu triliono?

Ofte oni jam provis kalkuli la nombradon de unu miliardo aŭ biliono, nombrante per moneroj po 10 mk. Persono rutinia pri nombrado nombras dum unu minuto eble 150 ekzemplerojn kaj nombrus do dum unu horo 90000 mk.; kaj per tio bezonus 11 horojn por la nombrado de unu miliono. Simpla kalkulo rezultas, ke dum 10-hora labortempo estus necesaj 5 jaroj por nombri nur unu miliardon. Kiel konate unu biliono entenas 1000 miliardojn, oni nun devus nombri 5000 jarojn por finombri ĝin.

Se ekz. Moseo estus komencinta ĉe la monto Sinaĵo, eble iu posteulo ĝuste dum la nunaj jaroj estus fininta nombradi unu bilionon. — Kiam li finus nun kun unu triliono? — Tio eble daŭrus, kalkulata en 10 mk.-moneroj 3 miliardojn da jaroj. Multaj scienculoj pridubas, ĉu nia sun-sistemo entute jam atingis aŭ iam atingos tiun ĉi aĝon. —

Estas interese, se oni klarigas al si, kion oni tenas en mano havante unu aŭ pli da bilion-biletaj en Germanujo. -pp-

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unufanke skribita, sed ne inter administraciistoj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj)

Ameriko.

Usono.

Boston. La Bostona societo malfermis bonajn, sed ne grandajn kursojn kaj komencis la 4 febr. tri klasojn, por lernantoj, por algradaj studentoj kaj por parolado. La gvidantoj: D-o D. O. S. Lowell, flino Eugenio Ohman kaj s-o Norman Frost.

Azio.

Ĉinujo.

Pekin. Post longa preparado de niaj Pekinaj s-anoj la Pekina Esp Kolegio malfermiĝis la 10 sept. Ĉirkaŭ 170 personoj sin enskribis por la kurso. En la mateno oni aranĝis malferman ceremonion solenan. Parolis s-o Tan Hsi-Hun, la kolegiestro; Malferma saluto kaj historieto de la naskiĝo de la kolegio; Esp. kaj homara progresado. S-o Ma Si-lun, ekvicieministro de edukado; Fortigo de natura muro inter la popoloj. S-o S. S. Su: Necesso de la lingvo internacia kaj ĝia historio. S-o Ĉin Mei-ĉiu: Historieto de Esp.-movado en Japanujo. Sekvis paroladoj interesaj de s-o S. H. Wu k. a. La b-nhumora parolado de nia malnova s-ano s-o Wu interesis ĝia amason.

Sangĥai. Sangĥaia Esp.-biblioteko fondiĝis ĉe la unua etago de Honan Road n-o 91, havante pli ol du cent diversspecajn librojn pri literaturo, scienco k. a. daŭranta kolekto de gazetoj. S-oj Ĉen Ĉauĵin kaj Hsu Yuen-ĉien estis elektitaj kiel ĝiaj sekretarioj. La inaŭguro okazis la 15 dec. (naskiĝtago de D-o Zamenhof). Pro propaganda celo ni kolektadas ĉiajn ajn esp.-aĵojn. Se-anoj enlandaj kaj eksterlandaj volas donaci, bonvolu adresu ĉiujn al: Sangĥaia Esp.-biblioteko, 1/4 s-o Ĉen Ĉau-ĵin, K7 Boone Road, Sangĥai.

En la kolegio de hina nacia lingvo dum lasta duono de l' jaro enkondukis Esp.; lecionojn donis s-o Houĉio. Krom regula leciono oni ankaŭ aranĝas presparojajn paroladojn.

Esp.-istaro de Norda Sangĥaio organizis la 36. Esp.-sociojn kun multaj membroj. Ĝi nuntempe propagandas nian lingvon per korespondado. Oni ankaŭ proponis eldoni gazeton.

Tsinan. Esp. societo fondiĝis kaj kurso malfermiĝis sub la gvidado de s-oj Daniel Ŝi kaj Liu. Multaj el la kursanoj estas fervojistoj kaj telegrafistoj.

Ĉanŝa. De la tempo de starigo de la loka soc. jam pli ol 150 personoj bone konas nian lingvon.

En Unua Normala Lernejo oni aranĝis kurson por Esp. dum somerlibertempo.

En la Popola Universitato kurso malfermiĝis sub la gvido de s-o Hvan Lujen. Tre multaj personoj sin enskribis al la kurso.

Wuhu. En la Lernejo de Agrikulturo kurso jam komencis. S-o R. T. Can kaj C. N. Wu gvidis.

Kanton. Kurso malfermiĝis en la soc. de anarĥista laboristaro kun multaj laboristaj kursanoj.

En Ĉukiang' angla lernejo kurso komencis sub la gvido de s-oj Gau kaj Can.

Ĉintan. La loka urba mezlernejo aldonis Esp. 70 studentoj sin enskribis.

Anpien. Je la bordo de Siensi provinco s-o T. Can kun liaj amikoj organizis esp. grupon kaj aranĝis kurson.

Eŭropo.

Albanio.

Shkodër (Skutari). Fervora s-ano s-o L. Skantola instruas Esp. Albanaj studentoj multe interesigis pri Esp.

Anglujo.

London. La 6 febr. s-o Gueritte, eksprez. de la Franca Komercia Ĉambro de London, faris en la loka sekcio de ekslernantoj de la asocio de francaj superaj komercaj lernejoj paroladon pri Esp. en la komerc. La paroladon ĉeestis la franca komercia ataseo, la ĝenerala konsulo, la prezidanto de la Franca Komercia Ĉambro kaj multaj eminentuloj de la franca kolonio.

S-o Gueritte estas malnova s-ano, ĉeestinta la kongreson de Cambridge. Li estas eminenta inĝeniero kaj havas la grandan honoron prezidi (kvankam franco) la Societon de Civilaj Inĝenieroj de Anglujo. S-o Gueritte partoprenis la konferencon de Venecio.

Ĉeĥoslovakio.

Praha. Ĉeĥoslovaka Esp. Instituto malfermis 9. l. sian klubojon en Mikulandská ul. 7 (gastioj akceptitaj estas ĉiumerkrede), aranĝis 10. l. paroladon de s-o Eisel pri Esp. en servoj de ĉeĥa homo. 14. l. malfermis „Privatan esp. lernejon“, apribitan de la instruadministerio (n-o 131488 25), kiun vizitas 82 lernantoj sub gvidado de ŝtate ekzamenitaj esp. instruistoj Eisel, Hlaváčová, Plišk kaj Šupichová en 2 kursoj por komencantoj. I por progresantoj kaj ŝtata kurso. — Radiotelefonan paroladon de s-o

Piŝkaj kaj ĝin akompanianta koncerto aŭskultis 31. 1. la instituciaj kaj iliaj gastoj en "Radio-Journal". — Okaze de la XVI-a regiona kunveno de la orienbohemiaj esp-istoj en Dvůr Králové paroladis 1. 2. s-o Piŝkaj pri ĉeĥoslovakaj turismaj allogaĵoj, akompanante la paroladon per 120 lumbildoj. — C. E. I. ricevis por siaj priurismaj celoj de la komercministro 5000 Kč mounsubsidio. — Je propono de C. E. I. komisiis la komercministro svedan esp-iston L. Tell per gvidado de la ĉeĥoj, informoĉeio en Stockholm, fiksimte lian komencataĵon 20000 Kč. jare. Ĉefa librovendejo Topič en Praha aranĝis laŭ peto de C. E. I. esp. ekspozicion en siaj reklamfenestroj.

Laborista Ligo Esp-ista (cikifala raporto).

Piŝej. La Laborista Societo havis sian duan ĝeneralan kunvenon 25 jan. en laborista domo „Peklo“. Prezidis s-o Oterholcinger. Raportoj de la funkciuloj estis akceptataj. Prez. s-o Keiser, del. en ĝenerala kunveno de L. L. E. estis s-o Pešek, Melková, Král, Hovorka, Valeš. Poste parolis s-o Pešek pri ŝovinisma gazeto „Na siráz“, kiu alportis artikolon dir. klifiganta kontraŭ Easo. kaj kondamnita laŭ-dece la eldonantojn de tiu ĉi gazeto.

Piŝej-Leŝná. Ĝenerala kunveno aranĝita 27 jan. en „Laborista D. mo“. Post raportoj de la funkciuloj, kiujn oni akceptis, paroladis s-o Pešek, prez. de L. L. E. pri utiliteco de Esp. Nova prez. s-o Kodl, sekr. s-o Proskovec.

Büchl V.

Piŝej-Karlov. La 13 jan. okazis du paroladoj, kies temo estis „Dalmacio lando de maro kaj suno“. Per 200 lumbildoj akompanis s-ano Jozefo Pech la ĝeĉestantojn de Piŝej al Wien, montrante al ili ĉiamierne ankaŭ naturbelcon de ĉeĥoslov. respubliko kaj antikvejojn de diversaj ĉeĥoslovakaj urboj. De Wien sekvis la vojo al Zagreb, Sarajevo, Risano, Kotor, Dubrovnik, vojaĝo tra Jugoslavio, Bosnio-Hercegovino kaj Montenegro. La paroladoj estis vizititaj de 250 personoj.

Piŝej-Karlov. Dua ĝenerala kunveno la 20 jan. en loka kunveno. Multe vizitiita, ankaŭ de ne-esp-istaj korporacioj. Por L. L. E. ĉeestis s-o Pešek, kiu trafite akcentis la signifon de Esp. por la koncerna medio. — En nomo de metallaboristoj salutis ĝeneralan kunvenon s-o Novotný, kiu parolis elokvente pri utiliteco de Esp. precipe por laborista ĝejunularo. — Kiel prez. de Asocio estis de nove elektata s-o Büchl, kiu reale priskribis al ĝeĉestantoj la laborajn celojn de venontaj taskoj, dankante la s-anojn por ĝisnuna kunhelpo. — Poste sekvis debato, post kiu per fervoro de ĉiuj ĝeĉestantoj la ĝenerala kunveno finiĝis.

Škorňany. Ĝenerala kunveno 21 jan. en loka lernejo. Prez. s-o Pešek saluakceptis la gastojn. Post raportoj de la funkciuloj, kiuj estis akceptitaj kiel prez. oni denove elektis instruiston Ĉeĥek, kiu estas bona garantio por disvastiĝo de Esp. Poste parolis s-o Pešek pri gravaj aferoj en esp. movado de la tuta mondo kaj pri organizado de societoj.

Podmohly. La ĝenerala kunveno estis la 27 jan. Kiel del. de L. L. E. Piŝej ĉeestis s-o Král. Denove elektita prez. s-o Šála.

Franujo.

Boulogne-sur-Seine. Kurso de s-ano Cotelle en la pafteĝo.

Clermont-Ferrand. Malgraŭ sia dujara ekzisto, la grupo havas jam 62-an membron.

Estage (Pyrénées Orientales). Nova grupo. Prez. s-o Etienne Salvat, komercisto, avenue de la Gare.

Le Mans. Kurso de grupo malfermita la 9 jan. kun multaj lernantoj.

Lille. Publika kurso de s-o Trofin. Inter la 30 lernantoj, la plejmulto estas studentoj de la Supera Komerca Lernejo.

Montchal (Loire). Kurso de s-o V. Girard, instruisto, kiu klopodas pri fondo de grupo.

Montmorency. La juna grupo ricevis moralan apogon de la Amika Unuiĝo de Komercistoj. La plej legata loka gazeto „La Tribune“ ofte presos artikolon por Esp. — Dum la festo de la Kooperativa Unuiĝo okazis vigila esp. propagando kaj vendado de lernolibroj.

Montrejeau (Haute-Garonne). Kurso de s-o R. Donis.

Paris. Nia fervora s-ano poŝtinspektoro Michels di Renzi, pro sia pensiigo, estas nomita honora prez. de la Franca Asocio Esp. de Poŝtistoj. La nova estraro konsistas el s-oi Henri Duteil, poŝtinspektoro (prez.), Robert, estraro de poŝtinficejo (vic-prez.), Lacroix (kasisto) kaj Fillière (sekr.). — La 31 jan. okazis la jara kunveno de la Paris'a grupo.

Sainte-Marie (Pyrénées Orientales). Propagando de la s-o Ramon Duran.

Strasbourg. La 15 dec. okazis sub la prez. de s-o Oesinger, vicurbestro, propaganda parolado de advokato Gérard kun kontraŭdiro kaj koncerta parto. Parolis ankaŭ hungara s-ano. S-o Oesinger akceptis la honoran prez. de la grupo, loka gaziario favore raportis.

Toulouse. Kunveno de la loka grupo okazas ĉiulunde, 11, rue du Taur.

Germanujo.

Kreuznach. Du s-anoj parolis pri Esp. en la membrokunveno de la „turisto-asocio de la naturamikoj“. Preskaŭ ĉiuj membroj de la „naturamikoj“ sekve de la parolado partoprenas al kurso.

Leipzig. La 21 jan. okazis efika propaganda parolado en la ĉiita 29-a popolernejo pri la temo: „Esp. kaj la lernejoj“. Parolinto s-o instruisto Degen. La direktoro de la lernejo promesis baldaŭnan enkondukon de Esperanto.

De post la 1 febr. okazas 5 Esp.-kursoj en la 57-a popolernejo, kiujn partoprenas entute 75 ĝinfanoj. 3 instruistoj instruas laŭ la lernolibro de Sireidi.

Radebeul. La 6. 2. s-o Kresianoff paroladis en Radebeul'a Esp. grupo pri popolaj kutimoj kaj kredoj en Bulgario. Li faris paroladon pri la sama temo la 27. 2. en Dresden.

Wiesbaden. La propagando estas sufiĝe malhelpata per la kontraŭlaboro de kelkaj idistoj en tiu ĉi urbo. La popola aliternejo intencis starigi kursojn por Esp., sed la idistoj sukcesis atingi, ke oni ankaŭ aliaŭ idon. Parolado por Esp. nur instigis la kontraŭlaboron de la idistoj. Por Esp.-kurso sekve de la ido-propagando nur enskribiĝis du personoj, por ido-kurso tamen neniu malgraŭ streĉa klopodo.

La 1 marto la popola aliternejo aranĝis diskuton pri Esp. kaj ido. La ĉefan referaton faris idisto D-o Klippers Esp. defendis per bonegaj argumentoj fervora s-ano instruisto Schönrich. En la diskutado partoprenis inter alie redaktoro Rob. Kreuz de ET, kiu devis reŭti la nekredible supraj faritajn historiajn kaj sciencajn klarigojn. La diskutado estis sen rezulto kiel ĉiuj tiaj aranĝoj. La esp-istoj konvinkigis tamen, ke en la sfero de la popola aliternejo ne estas eble trafite kontrastitaj al la idistoj, oni do daturigos la diskuton en la publika.

Hispanujo.

En Córdoba, Andaluzio, la movado esperanta nun bone progresas. Dank' al la fervoraj klopodoj de l' del.

de UEA s-o Francisco Azorin é Izquierdo Esp. nun estas instruata en privata lernejo „Escuela Obrera“ de prof. s-o Vaquero, nova esp-isto.

La ĉi tieaj samideanoj kunvenas ĉiujĵaŭde en la kafejo „Suizo“ de la 2-5 h p. m.

Kurson en novembro komenciantan oni bedaŭrinde ne povis daŭrigi kaj fini por la ĵusa stata ordono, ke ne estas permesita la instruado en oficialaj lernejoj de aliaj lingvoj ol la en la stata instruplano nomitaj. Oni tamen laŭeble malfermos kurson inter la laboristoj.

Italujo.

Padova (Campo S. Marino) 2 febr. Parolado de s-ano M. A. Allegranzi, docento de I. K. E. Oni malfermis kurson de I. grado per nia s-ano Mirza Marchesi.

Bari. Esp. bone progresas en la lernejoj. La 10 jan. Prof. A. Lacalandola de la Komeica Universitato malfermis kurson de Esp. en la Reĝa Mara Instituto, kie la direktoro Prof. ing. Michele Manca estas tre favora al la instruado de Esp. Li estis la unua direktoro de lernejoj en Bari, kiu antaŭ 2 jaroj permesis kaj favoris trege la instruado de Esp. en nia lernejo.

La 6 jan. Prof. Lacalandola de la Komeica Universitato malfermis kurson de Esp. en la Nacia Kolegio. Inter la lernantoj estas ankaŭ kelkaj albanaj studentoj, kiuj studas trege Esp.

Ankaŭ en la „Kolegio Nasuti“ (privata kolegio) de Bari la 6 jan. Prof. A. Lacalandola malfermis alian kurson de Esp. La estraro de tiu ĉi kolegio Prof. Nasuti estas tre favora al kurso de Esp.

Jugoslavio.

Janjina (Dalmacio). La klubo estas fondita fine de la 1922 nur kun 6 anoj. Nun ĝi nombras pli ol 50 anojn. Ĝis hodiaŭ estas gvidataj: 5 kursoj multvizitaj. Fine de la dec. de la pasinta jaro okazis anuzvespero.

Por la kuranta jaro estas elektita jena estraro: Prez. Dinko Baselli, vicprez. f-ino Anka Glavovič, sekr. Ante, Marinovič, kas. Vlahó Jasprica, bibl. s-o Božo Aničević, kiel komitatanoj: f-ino J. Lucica Kučer, s-o Ante Vičkovič, Ivo Rabaza kaj Mate Segovič.

Rumanujo.

Targul Mureš. La 26 jan. en la Kulturpalaco okazis ekzmena festeno, prezentita de la kursintoj de f-lino Terinjo Barabas antaŭ ĉ. 400 interesigantoj.

Oni povis vidi en la publiko ankaŭ la oficialajn reprezentantojn de la lokaj estraroj kaj plurajn direktorojn de lernejoj. La propagandajn parolojn komencis s-o D-o Groza en rumana kaj poezio D-o Mario Berde en hungara lingvoj, kiu en sia poezioj ena parolado kore salutis la bukarestajn gastojn alvenintajn en Targo. „La Belleŝomo de l' Rumania esp-ista movado“. Poste s-o D-o Josif (el Bucureŝti), vicprez. de Rum. Esp. Soc. faris longan paroladon pri Esp. (rumane) kaj s-o Andreo Ce (Bucureŝti), del. de UEA tenis paroladon (hungare) pri „Radiotelefono kaj Radiolingvo“. S-o Tiberio Morariu (Bucureŝti), sekr. de Rum. Esp. Soc. esperantlingve parolis pri la „Esperantista literaturo“. Sekvis la amuzaj partoj, kie la lernintoj en fuparoloj deklamoj kaj kantoj pravis al la publiko la vivebecon de nia lingvo. La sukcesa Esp.-tago per gaja kunesto finiĝis en la kafejo „New-York“.

Sekve de la vekita ĝenerala interesiĝo, s-o Jozefo Halasz, del. de UEA, preparas novajn kursojn.

Svedujo.

Gävle. En ĉi tiea teknika vespera lernejo kurso por 18 lernantoj de pli alta lernejo, dum gviditade de kasisto J. Helsing.

Zamenhof Monumento.

Kunveno de la loka pormonumenta komitato okazis en Warszawa lastan decembron en la domo de la Majstro. Ĉeestis: prez. de la Loka Kom. D-o W. Robin, hon. sekr. de la Internacia Kom. J. D. Applebaum kaj la sekvantaj komitatanoj: D-o St. Essigman, D-o J. Krenicki, s-o A. Oberrotman, s-o ing. Teichfeld, s-o B. Weinthal kaj kiel gastoj ĉeestis s-ino Klara Zamenhof kaj D-o L. Zamenhof.

La hon. sekr. raportis pri la nuna stato de la kazo enhavanta ĝis nun la sumon de ĉirkaŭ £ 200.

Oni priparolis la prezon donitan de skulptisto Lubelski por la fabrikigo kaj starigo de la monumento el pola granito kaj la konsilindecon de tiu propono. Post ĝenerala kaj profunda esploro de la tuta afero estas decidite, kontraŭ jam antaŭe proponita sugesto de la Organiza Komitato, ke: konsiderante la nunajn lokajn cirkonstancojn, labor-kondiĉojn, prezon kaj la kvaliton de la pola granito, estas preferinde kaj konsilinde fabrikigi la tutan monumenton en Skotlando el skota granito kaj transporti ĝin kompletan tra Danzig al Warszawa nur por la starigo.

Pri ebla neceso pagi altan sumon kiel dogan-takson ĉe la importo de la monumento, la hon. sekr. ricevis instrukciojn sin turni, pere de la Brita Esperanta Asocio, al la Pola Ambasadoro en Londono kun peto ke la monumento ricevu liberan eniron en Polujon ne pagante la lim-imposton.

D-o Robin raportis ke la fundamento por la monumento estas konstruita antaŭ nelonge sub la direkto de l' skulptisto Lubelski kaj estas nun tute preta por la starigo.

Estas decidite tuj aĉeti la ceteran grundon haveblan apud la tompo por prepari forbedojn sur ĝi kaj barilojn. La Majstro-edzino prenis sur sin la taskon trakti kun la tombeja estraro kaj raportu al la komitato.

Laŭ propono de s-o Weinthal, unuanime akceptita, oni esprimis la sinceran deziron de la pola esperantistaro prizorgi la kostojn de la transporto de la monumento inter Danzig kaj Warszawa kaj ankaŭ la koston de la starigo sur la tombon. La polaj esperantistoj, kiuj ĝis nun kontribuis preskaŭ nenion al la kazo, penas trovi tiujn elspezojn el sia propra poŝo.

S-o ing. Teichfeld entreprenos la faradon de detala desegno de l' premiita verko kaj sendos ĝin al la Org. Kom. laŭ kiu oni povos ellabori la monumenton tute fidele laŭ la originala modelo.

Avizo al la Naciaj Societoj Esperantistoj.

La detala desegno aludita en la supra raporto jam alvenis, kaj la Organiza Komitato nun traktas kun skulptistoj skotlandaj pri la fabrikigo de la monumento. Ĝia kompletigo, post la fikso de la prezo, ne estos longedaŭra.

Venis nun la tempo por ricevi detalajn tekstojn de la diversaj naciaj kaj aliaj gravaj esperantistoj societoj por engravuro sur la flanko de la monumento. (Vidu raporton ĉe la Nürnberg'a Kongreso pri monumento).

Ni petas do ĉiujn societojn alsendi al ni senprokraste tiujn tekstojn, ĉefe la korektajn nomojn de la societoj. Tiuj societoj kiuj ankoraŭ kontribuis nenion, kaj ekzistas multaj tiaj, ne forgesu ke la laboro kaj la materialo de la monumento kostas multe da mono, kaj la kazo ne estas jam plena, kiel pensas kelkaj esperantistoj.

J. D. Applebaum, Hon. Sek.

Universala Esperantista Pacifista Ligo.

Al ĉiuj ĉefkomisiitoj kaj anoj!

La 15 januaro ni fondis en Wien la organizaĵon: „Aŭstra Pacifista Esperantista Societo“ (= APES), kiu estonte plenumos la taskojn de UEPLO (= Univ. E. Pac. Ligo), disvastigi Esperanton kiel plej facile elterneblan kaj ne ŝtralan lingvon inter la pacifistaj rondoj kaj la pacifismon inter la esperantistaj rondoj. Krom multaj novaj esperantistoj el unuaj kursoj, ankaŭ esperantistoj el diversaj jam ekzistantaj aliaj unuiĝoj aliĝis. La estraro konsistas el: prez.: Rudolf Michael Frey, sekr.: f-linoj Camilla Stöger kaj Anna Ondryas, kas.: s-o Viktor Kasmader kaj f-lino Stella Freyer, konsilantoj: s-oj Karl Kläusnißer kaj Alois Sonntag.

La Esp.-konversacio de APESO okazas ĉiutage de la 7-9-a en ĉambro de la kafejo Pechtl en la 3-a distrikto en Wien, Marxergasse n-o 9 (angulo de Bechardgasse). Kiu aĉi eksterlanda esperantisto estonte venos al Wien, bonvolu viziti nin! Precipe estus dezirinde, se ĉiu amiko de la esperantisma pacideo nin vizituz, por ke nia valora afero floru kaj kresku!

Ĉar el eksterlando ne kontentigaj sciigoj — precipe pri la financa flanko — alvenis kaj speciale pro la morto de nia kara ne-anstataŭebla prezidinto d-o Giefwein ni decidis, ke la unua „Kongreso“ de UEPLO estu prokrastata. Nur la „kongreso“, sed ne la „programo“. Ni proponas en la kadro de la XVI-a du pacifistajn kunvenojn (laŭeble grandajn, tio dependas de la eksterlando!), krome po unu kunvido de la UEPLO-estraro kune kun la ĉefkomisiitoj antaŭ kaj post la unua ĝenerala kunveno. — Por ke ni havi bonan sukceson, estas tre necese, ke ĉiuj ĉefkomisiitoj almenaŭ legu la samajn gazeton „Esperanto Triumfonta“, kiu ĉiam tuj presigas la necesajn sciigojn! La sciigoj estos ankaŭ sendataj al „Esperanto“ (Genève) kaj al „La Lumturo“ (Bremen). — Ĉiuj ĉefkomisiitoj bonvolu same kiel ni ankaŭ fondi „Landan Pacifistan Esp-istan Societon“, ĉar estas absolute ne eble, havi UEPLogon sen „landaj societoj“. Anstataŭ „kongreso“ ni havos „Pacifistan Konferencon“, dum kiu ni devos elekti novan prezidanton, decidi pri taŭga estonta agadmaniero (statutoj) kaj jam komenci la antaŭpreparojn por la unua „kongreso“ de UEPLO.

Ĉar la LKK de la XVI-a komisiis nin, prepari la Pacifistan Konferencon“, ni petas la ĉefkomisiitojn tre urĝe vigligi fortan propagandan movadon en siaj landoj kaj igi, ke ĉiu amiko de UEPLO tuj aliĝu al la XVI-a!

Aŭstra Pacifista Esperantista Societo
R. M. Frey, C. Stöger,
prez. sekr.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neluigajn artikolojn.

259. Ril. al 245. Teknikaj terminoj.

Estas memkomprenebla devo de ĉiuj tradukanto de fakesprimoj, ke li esploru kaj studu ĉiujn proponajn kaj entute eblajn tradukojn antaŭ ol elekti iun. Ĉar la plej multe uzata fine farigis oficiala, kaj ĉar estas afero de la tradukantoj trovi la ĝustan.

Se la oficialaj radikoj ne sufiĉas por formi trafte kaj koncize la deziratan esprimon, se estas duboj, el kiu lingvo preni la novan radikon, mi proponas, ke ĝenerale oni preferu la germanajn lingvojn (kaj ankaŭ konsideru la slavajn. — Red.). Kiel konate, la latinaj vortoj estas pli multaj en Esp. kaj krome konstante plimultiĝas, ĉar la plej multaj fakesprimoj estas prenataj el la romanaj lingvoj. Tiel oni konservas la ĝustan proporciojn.

La vorton musono Boirac ĉerpis el la franca (Mousson); ĝi devenas de la araba „mausim“ sezono. Cetere ankaŭ la germana havas la fremdvorton Monsun. Kiel solvon mi proponas „monzono“, kiu estas ankaŭ ne duoble-senca. „Brodkasto“ ŝajnas esti superflua.

Leono Funken, Koblenz.
Rim. de la redakcio: Ni tute bone konsilas devenon de la vorto „musono“. La aldonita demando tamen tamen koncernis la precizecon de la esprimo mem. Kiel bedaŭrinde tro ofte la vortaro de Boirac estas malkompetenta. S-o Funken eraras pri „musono“ (germane Monsun kaj resp. vortoj en aliaj lingvoj), kiu ne estas Passatwind, vent alize ktp.

Kun plezuro ni legos pluajn klarigojn ankaŭ de aliaj personoj.

Ĉu ni pensas en lingvo?

Rimarko al la artikolo en ET 174.
S-o Lidl estas prava; ni pensas — kutime — en bildoj kaj imagoj; sed ofte ankaŭ en lingvo. Pripensante la estontan esperantan kongreson, la eventualajn amuzojn, travivaĵojn, renkontojn ktp., tio okazas per bildoj kaj imagoj. Sed se mi meditas, kiel mi senkulpigis min antaŭ la juĝisto, aŭ kion mi — meznokte, ebrie hejmeveninte — estas respondonta al la riproĉo-prediko de mia edzino, — tiam mi pensadas en vortoj.


La suĉinfanoj, surdmutuloj, inteligentaj bestoj, ne kapablantaj paroli, pensadas nur en imagoj. Revante pri kalkuloj, mi pensadas per numeroj; primemorante melodiojn, pentraĵojn aŭ odorojn, mi pensadas senvorte, senlingve.

Ankaŭ fiurilate estas prava s-ano Lidl, ke „se la pensado okazas rapidege, ne estas eble pensi en vortoj.“ Songante, ni kelkfoje pensadas en vortoj, ja eĉ laŭparolas la vortojn, — sed aliflanke, ofte ni travivadas longdaŭrajn aventurojn dumminute. Estas ja ĉiutaga sperto, ke ni dumsonĝe ĉirkaŭveturas la teron, ĉestis diversajn spektaklojn, interrilatis kun cento da personoj, — malgraŭ ke la tuta dormo daŭris nur kelkajn minutojn.

Mi parolas tute egalperfekte du malsamajn lingvojn, kaj pensadas, meditas, revas jen en tiu, en en alia lingvo.

Do resume, ŝajnas esti sendube, ke ni pensas per ideoj kaj imagoj, se la pensado okazas rapide, malprofunde, — sed ankaŭ per vortoj kaj paroloj, se la pensado estas pli detala, pli zorga, aŭ rilatas paroladon.

D-o Vilmos Austerlitz, kuracisto.



LEIPZIG-A FOIRO

La ĝenerala internacia Foiro de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj por Tekniko kaj Konstrufako

Printempa Foiro 1924 de la 2^a ĝis 8^a de marto
Aŭtuna Foiro 1924 de la 31^a de aŭgusto ĝis 6^a de septembro.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroŝefo por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN IN LEIPZIG

Ĉiu

literatur-amanto, studento kaj speciale tiu, kiu interesiĝas pri geografo, kutimoj, moroj, popolo kaj lando de fremdaj nacioj nepre devas interesiĝi pri

„Litova Almanako“

eldonita de Litova Esp. Asocio en Kaunas. Sur 285 paĝoj tio bonege kaj alloga aranĝita libro informas pri litova literaturo, penso kaj vivo per artikoloj de unuarangaj esperantistoj de Litovio.

Prezo nur 3,5 sv. fk.

Mendojn adresu tuj al Eldonejo de Esperanto Triumfonta
Horrem b. Köln.

Ni serĉas perfektan, diligentan

Maŝinkompostiston je Linotipo (simpla)

por la kompostado de ET kaj de germanlingva ĵurnalo. Kondiĉo: sufiĉa scipovo de Esperanto.

T. & H. Jung, Horrem b. Köln

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, flandiĝo, edziĝo, morto, okazontaĵoj gravaj esp. kunvenoj, festoj k.s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de o k ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Anoncetoj, ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas per propra i anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2 mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

EDZIĜO. S-o Andreo Végli, konstruad-entreprenanto, Pécs, Hung., edziĝis la 26 januaro kun f-lino Margarete Horvatits el Pécs. [1]

La „Aŭstra Pacifista Esperantista Societo“ decidis, interrilati kun la samideanoj precipe kun esp. „pacifistoj“ sur la tuta terglobo per vidajkartoj, kiuj restos propandecele propraj de APESO. La APESO-anoj certe respondos ankaŭ per vidajkartoj de nia belega urbo. Adreso: Aŭstra Pacifista Societo Wien, III., Bechardgasse 14. Tür (= pordo) 18. Vigla reciproka korespondado estas tre dezirinda pro pli bona interkonatiĝo dum aŭgusto okaze de nia XVI a! El ĉiu urbo skribu almenaŭ unu esperantisto ĝis aŭgusto minimume unu vidajkarton. [1]

TUTMONDA SAMFAKULARO ATENTU! Laŭ sciigoj de la Loka Kongreso Komitato por la XVI-a niaj ŝatataj interesuloj estas informitaj, ke ili troviĝos ĉion en bona preparo. Okaze de nia translokiĝo ni salutas ĉiujn samideanojn kore. Bonvolu viziti nin dum aŭ antaŭ la kongreso, kiam iu vojaĝos Vienon, por ebligi al ni la plezuron, montri nian entreprenon komercan kaj interrilati diversflanke. Skribu ĝustatempe al: Röder-Raabe S. A., granda entrepreno drogistia, Wien 5, Köllrigasse 10. [2]

NUMERO 2 de ET deziras aĉeti Brita Esperanto Asocio, 17 Hart Street, London WC 1. [2]

KIU POVAS havigi al mi la unuan numeron de „Literatura Mondo“ (okt 1922) bonvolu fari proponon al mi. Fr. Schoofs, Direktoro de „Belga Esperantisto“, Kl. Hondstraat 11, Antwerpen, Belgio. [2]

ITALA DOKTORO pri ekonomi-komercaj sciencoj, fraŭlo, 24-jara, ire volonte sin okupus ĉe granda industrio kiel kontrolanto aŭ ĉef-librotenisto, aŭ kiel administranto ĉe grava riĉa familio: aŭ ĉe serioza instituto kiel oficiisto. Eksterlandano sendu tuj proponon esperante itale, france, aŭ angle al D-o Vito de Benedetto, det. de UEA, Lecce, Sud Italio. [4]

KORESPONDVESPERO. Borislava grupo de esp-istoj aranĝas la 16 marto korespond-vesperon kun 4 premioj, por sendotaj plej belaj pk. 1. grupo: gelaboristoj, labor-movistoj kaj ĝeneruloj, ricevos artan bildojn historian de la polaj laboristaj liberec-bataloj. 2. grupo: kartokolektantoj, filatelistoj kaj monistoj ricevos po belaj kolektoj koncerne ilian kolektaĵon. Skribu vian adreson legeble, por ke ĝustaj personoj ricevos premiojn, ankaŭ ĉiuj ricevos respondon koncerne sukceson de vespero. Pri premioj decidis komisiono kun delegito de UEA. Sendaj adresoj: S-o Roman Wulček, Kasa Chorych, Boryslaw, Polujo. [2]

RUSA FRAŬLO, 21 aĝa, amanta la naturon, ne ŝatanta la vivon, libera de iuj ajn superstiĉoj, iomete poetema, intencanta en proksima estonteco komenci framandan vojaĝon, deziras korespondi kun junaj fraŭloj de diversaj landoj, celante amikecon kun kelkaj personoj, celo: en unua lertero skizi sian personon de ĉiuj flankoj. Adreso: Al Aleks. Novokreŝenov, po Mikaelo Malisev, Geleznodorojna ul. 51, Serdobsko, Saratova gub., Rusujo. [2]

Korespondoj kaj Interŝanĝoj.

S-o Max Krensel, Kl. R. W. Str. 25. 5, Annaber (Saksujo), Germanujo, deziras interŝanĝi kun la tuta mondo per il. pk. [2]

Dek Esperantogelernantoj (16—25 jaroj) en teknika vespera lernejo deziras interŝanĝi il. pk. kun eksterlandaj gesamideanoj. Adresu al kasisto J. Helsing, Gävle, Svedujo. [2]

Van Lishout Antoine, Nieuwe Begijnhofstraat 57, Gent, Belgujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kun gesamideanoj de la tuta mondo. [2]

S-o Alfred Liebig, Obersteigensdorf, Bahnhof, Silezio, Germanujo serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam respondos. [4]

S-o Lothar Presser, Alexisstr. 12. 2, Breslau V., deziras interŝanĝi Pm., Pm., L., kaj monon. [2]

Du amikoj esperantistoj, J. Eiglmaier, Eisenhammerstr. 8 b, Augsburg, Germanujo, kaj M. Simnacher Neuburgerstr. 66, Augsburg 10, Germanujo, deziras korespondi per il. Pk. kaj L. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Ĉiam respondos. [2]

Juna floristino deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo; korespondas ankaŭ germane. F-lino Charlotte Tiehy, Rybna ul. ĉ. 669/4, Praha 1, Ĉeĥoslovakio. [2]

S-o Juraj Mraz, studento, Maksimirska cesta 14, Zagreb, Jugoslavio, deziras korespondi kun tuta mondo per il. Pk. (bfl), interŝanĝas Pm. kaj papermonon. Nepre kaj tuj respondos. [2]

S-o Debarbieri Guglielmo, Via Casaregus 55, Genova, Italujo, deziras interŝanĝi Pm. kaj Pk. kun ĉiuj landoj. Preferas jugoslavojn, japanojn, hinojn, aŭstralianojn, amerikanojn. [2]

S-o Blommaerts, Ŝtata instruista lernejo Ledeganckstraat 8, Gent, Belgujo, deziras interŝanĝi Pk. il. (bfl.) Pm. librojn kaj lertojn. Korespondas ankaŭ pri literaturo. [2]

F-lino Erna Tietze, Annenstr. 28, Merseburg (Saal) deziras korespondadi per lerteroj kaj il. Pk. Ankaŭ interŝanĝas Pm. Respondas ĉiam. [2]

F-lino Frida Kunth, Golthardtstr. 50, Merseburg (Saale), Germanujo, deziras korespondi per il. Pk. kun ĉiuj landoj. [2]

F-lino Marie Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germanujo, deziras interŝanĝi il. Pk. kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg (Saale), Germanujo, deziras korespondadi per il. Pk., L. kun ĉiuj landoj, interŝanĝas il. Pk. pri hom-tipoj kaj naciaj kostumoj, ankaŭ Pm., interŝanĝas fotografaĵojn. [2]

S-o Otto Klapper, Luisenstr. 10, Merseburg (Saale) Germanujo, deziras korespondadi per il. Pk. kaj interŝanĝas Pm. [2]

S-o Karl Lohmann, Hallesche Str. 7, Merseburg (Saale), Germanujo, deziras korespondadi per il. Pk. kun ĉiuj landoj. [2]

18-jara f-lino deziras korespondi per il. pk. kaj l. El. Iv. flatoj, Gagarinskij n-o 1, kv. 12, Leningrad, Rusujo. [1]

Kiu volas aĉeti rusajn librojn, bonvolu skribi al s-o A. Saharov, Gagarinskij n-o 1, kv. 12, Leningrad, Rusujo. [1]

Ges-anoj atentu! Mi deziras interŝanĝadi naciajn ilustraĵojn, ne satirajn ĵurnalojn kaj ankaŭ elranĝaĵojn el diversaj ĵurnaloj. Mi sendas rusajn kaj petas vianlandajn. Ĉiam respondos. L. Sulpovar, Stuleŝnikow per n-o 7, kv. 9, Moskva, Rusujo. [1]

Se vi volas havi ĉiaman kaj akuratan korespondadon, skribu al s-o Venceslavo Vernikovskij, Bolotnaja ul. n-o 10, komn. 14, Moskva, Rusujo. [1]

Kiu sendos al mi iun kvanton da poŝtmarkoj de sia lando, ricevos tuj la saman kvanton da poŝtmarkoj polaj kaj aliaj. Kontraŭ diversaj mi sendos diversajn. Mi petas sendaĵojn rekomenditajn. Pomsnik M. Grodzki, Tuszewo, poŝto Grudziadz, Polujo. [1]

Rusa radiotelegrafisto deziras interŝanĝadi lertojn kun samprofesioj el ĉiuj landoj pri ŝenlandaj telegrafaj kaj telefonaj stacioj. Mi tre petas sendi fotografaĵojn de viaj stacioj. Adreso: M. Volberg, Razgulaj Bolsoj Demidovskij 10, kv. 5, Moskva, Rusujo. [1]

S-o Arne Rundberg, Källtorp, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj prefere kun eksteruloj. [1]

S-o Anders Lindmann, Holmgatan 4, Falun, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, prefere kun junuloj. [1]

Kiu deziras korespondi kun mi pri diversaj temoj? Mi atendas respondojn el ĉiu provinco de Esperanto. Fraŭlo Hasse Elften V., Hargsvägen 20, Mjölby, Svedujo. [1]

Juna sveda fraŭlo, Charles Peterson, Box 54, Mjölby, Svedujo, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Tre volonte kun fraŭlinoj. Mi volas interŝanĝi esp. gazetojn kaj il. pk. (Afranku bfl.) Ĉiuj eksteruloj ricevos belan il. kajereton el mia lando. Mi estas I.O.G.T.-ano kaj mi tre volonte volas korespondi kun tiaj samideanoj. [1]

S-o R. H. P. Jansen, Da Costastraat 19, Hago, Nederlando, deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. Mi respondas kiel eble plej baldaŭ. [1]

Por 1 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas la diversajn germanajn pm. (miliona valoro) kaj 5 diversajn litovajn Memmarkojn. Fritz Zyleit, Grabnik ĉe Lyck (Ostpr.), Germanujo. [1]

Necesaj libroj por literaturaj vesperoj.

Bennemann: <i>Tra la mondo</i> Internacia legolibro	or-mk.
l-a parto: Por komencantoj, 2. eld.	1.—
ll-a parto: Por progresintoj	1.50
Dietferle: <i>Vendreda Klubo</i> 11 originalaj artikoloj	1.60
Forge: <i>Abismoj</i> . Romano originale verkita, broŝ.	1.80
bind.	2.75
Internacia Mondliteraturo l-a serio: 10 volumoj, kart. po Postulu detalan katalogon!	1.—
Luyken: <i>Stranga Heredaĵo</i> . Romano originale verkita, broŝ.	5.—
bind.	4.—
Privat: <i>Historio de la lingvo Esp. Deveno kaj komenco</i> , kart.	1.25
<i>Vivo de Zamenhof</i> (speciala eldono por mez- kaj bonvalutaj landoj)	
kart.	2.—
bind.	5.—

1.— ormarko = 0,24 dolaro aŭ la sama valoro en alia nacia mono.
Sendkostoj: 5% de la pagota sumo.
Novaj verkoj en preparo! Postulu nian katalogon!

Ferdinand Hirt & Sohn,
Esperanto-Fako Leipzig.

Kongresnumeroj de ET.

Se vi ne jam posedas la kongres-numerojn de ET, mendu ilin tuj, antaŭ ol la provizo de niaj juŝ alvenintaj kongreskestoj elĉerpiĝis. Escepta prezo por la serio de 5 numeroj ĝisplue estas nur 30 sv. centimoj aŭ 1 ET-num. por abonantoj.

Skribu tuj al la Administracio de ET
Horrem b. Köln, Germanujo.

Se vi bezonas Esperantaĵojn

postulu la riĉenhavan katalogon de niaj multe ŝatataj eldonaĵoj! :- (Lerno- kaj ekzercolibroj, vortaroj, literaturaj verkoj ĉiuspecaj, insignoj, propagandiloj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto! La plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj. Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m. b.H., Berlin SW 61, Wilmstrasse 61 (Germanujo).